

# *Kluba Bulteno*

Organo de Klubo Esperantista en Oslo

**N-ro 4 2013**

**Ĵaŭdon la 31an de oktobro**

**61a jaro**

## **Kalendaro**

Ni avertas ke povos okazi ŝanĝoj. Ĉiuj kunvenoj komenciĝos je la **18a**.

### **Lundon la 4an de novembro (semajno 45) – mandag**

Refoje ni aranĝos specialan kunvenon por novaj interesiĝantoj. Sed ankaŭ jamaj membroj bv. veni renkonti la novulojn kaj helpi respondi iliajn demandojn. Ni povos komputile spekti la jubile-jaran filmon (47 min.) kaj ankaŭ novajn filmetojn.

*Vi setter opp et nytt spesielt møte for nye interesserte. Men også for medlemmene som vil møte de nye og svare på spørsmålene deres. Vi kan se på filmen om Esperanto fra jubileumsåret (47 min.) på data-skjermen og noen nye kortfilmer.*

### **Lundon la 18an de novembro (sem. 47) – mandag**

Muzika kunveno: Thomas Jouanne klarigos la historion de la gitaro kaj ludos/kantos du-tri kantojn.

*Musikkmøte: Thomas Jouanne forteller om gitarens historie og spiller/synger to-tre sanger.*

### **MARDON la 3an de decembro (sem 49) – TIRSDag**

Leif Arne Storset kaj Douwe Beerda partoprenis en pedagogia kurso de Katalin Kováts dum la itala landa kongreso. Vidu *Inter Ni Dirite* 5/2013.

*Leif Arne Storset og Douwe Beerda forteller om et pedagogikkurs i Italia med Katalin Kováts, der de deltok i sommer. Vidu Inter Ni Dirite 5/2013.*

### **Lundon la 16an de decembro (sem. 51) – mandag**

Cato Haugen raportos pri Zamenhof-taga aranĝo (AIS-sesio) en Bydgoszcz kaj Toruń.

*Cato Haugen forteller fra årets Zamenhof-arrangement i Bydgoszcz og Toruń i Polen.*

### **Lundon la 6an de januaro (sem. 2) – mandag**

Literatura kunveno. Ĉiu prezentu iun libron.

*Litteraturkveld. Alle velger en bok og forteller om /leser fra den.*

Kaj – kiaj / *hvilke* perspektivoj por Esperanto en 2014?

# OKAZIS

## Lundon 2. septembro

Ni aranĝis specialan informan kaj konatiĝan kunvenon por la novaj interesatoj kiuj venis al nia informbudo en la Mela-festivalo. Venis du el ili. Ni donis superrigardon de la E-movada agado intera/alekstera kaj urba / landa / tutmonda (kaj ankaŭ montris bildojn el la somera Universala Kongreso en Islando).

## Lundon 16. septembro

Ni diskutis pri la temo de la ĵusa referendumo, eventualaj olimpiaj ludoj en Oslo, kaj pri la perspektivoj de partia koalicio surbaze de la parlamenta elekto.

## Lundon 30. septembro

Kjell Peder partoprenis plurajn

ekskursojn antaŭ, dum kaj post la Universala Kongreso – en Islando kaj eĉ al Gronlando – kaj povis rakonti pri tiuj, ankaŭ montrante ampleksan kolekton da kulturaj kaj turismaj broŝuroj. Pri la kongreso mem Otto resumis la programon de la Kongresa Universitato (kiun li rektoris) kaj komentis pri ĝi kaj pri aliaj kunvenoj – Kleriga Lundo, prelegoj pri Islando kaj pri la historio de Esperanto, kulturaj vesperoj, renkontiĝo kun la Akademio k.a.

## Lundon 21. oktobro

Kjell Peder rakontis pri la internacia fervojista kongreso en Francio, precipe pri la planoj kaj progresoj pri pli rapidaj trajnoj en diversaj eŭropaj landoj.

---

## Ĉu ŝanĝi la kunven-tagojn?

En la lastaj jaroj ni kunvenas lunde, la unuan kaj la trian lundojn de la monato. Sed montriĝas ke tio ne konvenas por ĉiuj: Iuj estas okupitaj eĉ ĉiulunde kaj sekve neniam povas veni al kluba kunveno.

Ĝis 2008 ni kunvenis alterne lunde kaj marde, sed ni ŝanĝis tion laŭ enketo inter la membroj, ĉar iuj ne povis veni marde, aŭ trovis la sistemon tro komplika. Ĉu nun repreni la malnovan sistemon?

Plia propono: ĉu de tempo al tempo aranĝi kroman kunvenon sabate je la 13a (en taglumo)?

**Kion vi opinias?** En estrara kunsido meze de januaro ni planos la vintrajn kunvenojn surbaze de la ricevitaj preferoj de la membroj.

Skribu retpoŝte al [oficejo\[a\]esperanto.no](mailto:oficejo[a]esperanto.no) aŭ letere al nia oficejo, aŭ telefonu al 22 35 08 94 (kaj ev. lasu mesaĝon).

**PÅ NORSK** Vi overveier å gå tilbake til det gamle systemet, med medlemsmøter på mandager og tirsdager annenhver gang. Kanskje også ekstramøter en gang i blant på lørdager kl.13. Hva mener du? Send en e-post eller ring kontoret.

## Libroj en la vendobretaro

Kelkajn librojn ni aĉetis lastsomere rekte de la eldoninto, Flandra E-Ligo (FEL), per ies vojaĝo – do ni ŝparis la afrankon kaj vendas ilin por la netaj FEL-prezoj. Sed atentu: TIUJ LIBROJ RESTOS EN LA VENDOBRETARO NUR ĜIS LA JARFINO!

**Pri homoj kaj verkoj** Red. Michela Lipari kaj Humphrey Tonkin, 2012, 142 p. 76 kr. Dek unu eseoj premiitaj en la Belartaj Konkursoj de UEA, de naŭ aŭtoroj, pri verkoj de la E-literaturo kaj ties aŭtoroj.

**Bildoj pri Norda Lando kaj aliaj rakontoj** Sen Rodin (pseŭdonimo de Filippo Franceschi, n. 1932). 2006, 360 p. 182 kr.  
Novelaro pri la spertoj de juna sudlandano en Norda Lando, plus aliaj allogaj noveloj.

**La Origino de Specioj** Karolo Darwin. 2009, 430 p. 180 kr.

Elangligis Klivo Lendon.

"Referenca verko kiu, post sia apero antaŭ 150 jaroj, influis ĉiujn vivosciencojn. Ne eblas troigi la gravecon de tiu ĉi verko. La teorio, kiun Darvino prezentis en ĉi tiu libro, radikale ŝanĝis nian komprenon pri la vivo kaj ĝia historio. Kvankam la vivosciencoj tre multe progresis ekde ĝia unua eldono, *La origino de specioj* rests leginda, eĉ legenda, por ĉiuj, kiuj interesiĝas pri la teorio de la evoluo."

**Kvazaŭ ĉio dependus de mi**. Trevor Steele. FEL, 2009. 344 p. 144 kr.

Ĉi tiu romano baziĝas grandparte sur la vivo de Carl von Ossietzky, unu el la fruaj viktimoj de la plej fia reĝimo en la homa historio. István Ertl skribis: "La strukturo sukcesas surporti la pezon de la romano, ĉar bone tenas la intereson la paralelaj fadenoj de la sorto Germania, kaj tiu, persona, de Kurt Lenz. Tio ke ni jam scias al kio kondukis la potenciale ankoraŭ plurdirekta kaoso de la Weimar-a Respubliko, kreas suspenson tian kian ni sentas ĉe krimhistorio, sciante murdon neevitebla... Sed bonas ja ke la romanstrukturo fortas, ĉar tio maskas plurajn malperfektaĵojn, plejparte minorajn."

**Plano B** Lester R. Brown SAT, Parizo, 2009, 344 p. 170 kr

Mobilizo por savi civilizacion. "Sinteza dokumento pri la nuna stato de la mondo (el naturmedia, sociala kaj politika perspektivoj). "Jen finfine kompleta kaj fundamenta esperantlingva referenc-verko pri nuntempa stato de la mondo (el naturmedia, sociala kaj politika vidanguloj)."

## Info-budoj en foiroj?

Bonan okazon renkonti la publikon kaj informi pri Esperanto donas informbudoj en foiroj, konferencoj kaj festivaloj, sed ili ne tre oftas. Foje ili okazas loke, for de la urbocentro, ekz-e en loka biblioteko. Se vi vidus / aŭdos pri tia aranĝo, kie eblus starigi informbudon (senpage aŭ malmulte-koste), bv. sciigi tion al ni.

**Viktig:** *Si fra om du vet om en messe eller en konferanse hvor vi kan få satt opp en info-bod eller en liten utstilling.*

---

## Aliaj libroj k.a. en la vendobretaro

**Lærebok for nybegynnere: Esperanto – den direkte metoden** – basert på tegninger, av Stano Marček. Fotnoter og forklaringer på norsk. Egner seg ypperlig for selvstudium. 2007 **norsk utg. 2012. 116 s. 45 kr. CD 80 kr.**

**Kalevala.** La fama finna nacia epopeo. 392 p. Ilus. Malmole bindita. 90 kr.

Michael Ende: **La senĉesa rakonto.** 364 p. Malmole bindita. 175 kr.

**Esperanto – över 50 miljoner träffar.** [Nun > 170 milionoj!] Lars Forsman rakontas el siaj spertoj pri instruado al lernantoj el la tuta mondo dum 18 jaroj en la popolaltlernejo de Karlskoga. Amplekse ilustrita. 95,- .

## T-ĉemizoj po 100 kr

Verdaj, kun blanka teksto *Vi snakker esperanto. Gjør du? .*

Blankaj, kun verda/bruna teksto *Esperanto er kult.*

Blankaj, kun verda/bruna teksto *Esperanto la internacia lingvo*

**Glumarkoj:** ruĝaj (4 x 7 cm), por valizo, (dorso)sako, teko .... po 2 kronoj; Ankaŭ (svedaj) kun verda stelo kaj la vorto "Esperanto" en parolveziko (videblas interrete ĉe [esperanto.se](http://esperanto.se)).

**Stokoj de ĉi ĉiom en la kluboj; ankaŭ vortaroj, gramatikoj, literaturo.**

**Kompletan liston de vendotaj libroj k.s.** vi trovos interrete ĉe [esperanto.no](http://esperanto.no) → **LIGILOJ** (supre) → **Literaturo ...** → **librolisto.**

---

Klubo Esperantista en Oslo, Olaf Schous vei 18\*, 0572 Oslo. Tlf. 22 35 08 94  
\* inng. Schouterrassen. Tramo 17 aŭ buso 31 al Rosenhoff aŭ metroo al Sinsen.  
[www.esperanto.no/oslo](http://www.esperanto.no/oslo) Retpoŝto: <[oficejo\[a\]esperanto.no](mailto:oficejo[a]esperanto.no)>  
Bankkonto 0532 36 19699 (sed kotizon pagu al *NEL/Forbundet* 0533 05 22870).